



JEN



Numero #4

Novembro 1962

BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

NOVA KADRO DE JEN

Ni kun plezuro anoncas, ke JEN nun adoptis plenkreskan kadron, en kiu pli efike servadi al la usona E-ista junularo.

Tiu ĉi nova antaŭenpaŝo inkluzivas plurajn aliigojn de reguloj pri membreco.

Jen la decidoj:

Jarmembreco en JEN kaj jarabono al la JEN-Bulteno -- \$1.00 aŭ egalvaloro. La organo daŭre aperos almenaŭ dumonate, kaj ni esperas eventuale fiksi la eldonadon ĉiumonata, samtempe multe plibonigante la kvaliton kaj la formaton. Tio fakte estas la ĉefa kialo de la kostigo.

Tiuj pioniraj gemembroj, kiuj aliĝis antaŭ la nova kadro (de la ekapero de la Bulteno ĝis la nuna dato), senpage restos membroj por la kuranta jaro; tamen ni sugestas, ke ankaŭ tiuj pagu la abonkotizon por helpi rapidigi la atendatajn plibonigojn.

JEN nun petas aliĝrajton al TEJO (Tutmonda E-ista Junulara Organizo), organizo kiu de nun ricevos apartan apogadon de UEA, al kies Laborplano ĝi kaj ĝiaj landsekcioj konformos. Aliĝo al TEJO en multaj rilatoj pliutiligos nian Bultenon, kaj neniel efikos al la baza liberaleco de ĝia enhavo.

Nejunuloj, kiuj deziras nur ricevadi la Bultenon, ankaŭ pagos abonaprezon \$1.00 aŭ egalvaloron, sed ne ĝuos kromajn avantaĝojn de JEN-membreco. Okaze, ke iu, iam ajn, sentos deziron iom helpi al sia junularo -- kiu ja konsistigas la estontecon de la movado, kaj kiu ĝis nun havis perfekte nenian vivon en nia lando -- ni nepre bonvenigos donacojn de \$5.00 aŭ pli. Tiajn donacojn ni prudente uzos por daŭrigi junularan aktivecon vere taŭgan por nia landmovado. Ili sume aperos en periodaj raportoj de la kasisto.

Jen la nuna gvidantaro:

RICHARD P. KOLLIN, 30 Ave. B, NYC 9, Usono	Sekretario
KEN MINER, 30 Ave. B, NYC 9, Usono	Redaktanto de JEN-Bulteno
STANLEY COHEN, 16 Long Ave., Allston 34, Mass.	Kasisto
JOHN F. KOOISTRA, 30 Ave. B, NYC 9, Usono	Komisiito pri Universitatoj
HUMPHREY TONKIN, Apt. 6, 7 Linnean St., Cambridge 38, Mass., Usono	Komisiito pri Ekster landaj Aferoj
JONATHAN POOL, Lowell House, L-42, Cambridge 38, Mass., Usono	Komisiito pri Varbado

LA BONA VIVO
(Parto Unua el Serio)

Antaŭ jaroj, kiam mi deĵoradis en malgranda maŝinejo en Flushing kiel tornisto (tornanto, almenaŭ), mi havis tre bonan kaj fidelan amikon, Frederiko, kiu ofte al mi ŝerceme petis, "Do, Ken, diru al mi pri la Bona Vivo!" Tio estis de li ĉiamatena saluto. Efektive li ne kredis, ke mia vivo estas iel pli bona, ol sia; nur mi kredis tion, kaj pro bona kaŭzo. Frederiko havis tri infanojn kaj forlasintan edzinon; mi havis, dank' al Dio, nur min mem. Li havis monŝuldojn kaj grandan luprezon; mi ŝuldis nenion kaj loĝis kun finna maljunulino (kiu estis Budaistino, parenteze) kaj pagis nur etan sumon por luo.

Tiele, dum mi pasigis la vesperojn esplorante Budaismon kaj la finnan lingvon, Frederiko vizitadis vespero-lernejon por fariĝi pli bona tornisto. Mi tre kompatis Frederikon; estis mia kutimo dum tiuj tagoj kompati ĉiujn homojn, ĉar en la plimulto mi vidis ian sklavecon al la sociala sistemo, tute ne rimarkante tion en mi mem; eble tiu pretervido kaŭzis, ke mi neniam pensis pri politika solvo al homaj problemoj kaj suferoj. Ankoraŭ mi same pensas kiel tiam, ke tiuj problemoj estas moralaj, pli ol politikaj.

Mi kaj Frederiko ofte diskutis pri la Bona Vivo. Ni pasigis tutajn vesperojn, kelkfoje ĝis tagiĝo, argumentante pri tiu temo. Nu Frederiko estis unu el tiuj personoj, kiuj ĉiam tenas en konvena loko sian "biblion," sian plejŝatatan verkon, kies valoron kaj saĝecon ili pli alte taksas, ol ĉia alia literaturo. Ĉe Frederiko, estis ĉiam sur apudseĝa tableto en la salono "Rubajato de Omar Kajam." El ties paĝoj Frederiko havis mirindan kapablon, tiri respondon aŭ taŭgan komenton al iu ajn leviginta demando. Li fakte povis deklami tutajn paĝojn parkere sen eraro.

Eble pro sia amo al la "Rubajato" Frederiko unu vesperon diris (ne unuafoje), "Nu, la homo eliras per sama pordo, per kiu li envenis."

"Kaj dum li estas en la domo?" mi instigis.

"Vi aludas la vivon, mi konjektas."

"Bone, ŝajnas al mi, kompari la vivon kun domo, ĉar ni pasigas grandan parton el nia vivo en domoj."

"Malbone," kontraŭopiniis Frederiko, kiu naskiĝis en Nebrasko kaj tre malamis la urbon, "Tio estas nenatura. Jen la ĉefkaŭzo de homara suferado: la nenatureco."

Tiu argumento jam estis familiara; tiel tre emas paroli la kamparanoj.

"Sed tio laŭ vi natura estus por mi nenatura," mi elmontris, "Krome mi opinias, ke oni povas fari feliĉan vivon eĉ el urba, endoma loĝado. Mi alkitimiĝis al urboj; nun kiam mi vizitas parencojn kampare, la silento vekas min dumnokte."

"Tio estas neeble."

"Sed jes; mi antaŭ jaro loĝis rekte sub trajnponto. Ĉiun sesan minuton trajno superpasis. Mi alkitimiĝis. Vi havas bonŝancon, Frederiko; almenaŭ ĉi tie en Flushing estas iom kvieta."

"Aĥ, ne temas pri kvieto-nekvieto... jen la afero: la homo -- nu -- kreigiĝis por digna ekzistado en libera aero. Li kreigiĝis por regi la mondon, por havi sub la piedoj firman teron, ne betonon; por spiri freŝan atmosferon, ne fumtubajon."

"Jes, ĝuste tial mi ne fordonis la fumadon, ĉar la cigaredfumo estas pli saniga ol la cetera aero."

"Sed serioze, ĉu vi ne kaptas mian ideon? En la pasinteco homoj estis HOMOJ, ne sklavoj... nu la plimulto ne estis sklavoj... kaj vivadis noble, digne, honore..."

"Kaj malvarme, kaj malsate," aldonis mi. "Frederiko, vi devus akcepti vian mondon, ĉiun brikon, ĉiun polveron. Kio iam okazis en Edeno, estas senrilata al la nuno. La nunan mondon la, kiel vi diras, noblaj kaj dignaj homoj mem kreis; ĉu el nobla origino povas veni malnobla produkto?"

"Absolute," respondis Frederiko, "Aŭskultu jenan version de Omar..." Lia mano etendiĝis aŭtomate al la tableto.

"Forlasu tiun ebrulaĉon; la tuta poemo apartenas al Fitzgerald iuokaze."

"Ho ve! Ek nun per via nescio vi superas vin mem!" kriis mia fidela amiko.

"Sed tio ne gravas. Estas la etaj aferoj en la vivo, kiuj gravas. Ekvekiĝo, ekzemple. Kiel dolore, ellitiĝi! por milionoj da homoj. Por mi ne. Ĉar antaŭ ol enlitiĝi vesperofine, mi preparas ĉion por facila matena aktiviĝo. Mi metas kafon en la filtrilon, starigante tion sur la flamingon. Same akvon por grio kaj ovojn. Mi metas freŝan klingon en la razilon, ŝuojn kaj ŝrumpetojn rekte apud la liton por ke mi matene ne duonblinde devu serĉi ilin. En pelvon mi verŝas fridakvon por ŝprucumi kungluitajn okulojn..."

"Ne temas pri ellitiĝoj; temas pri gravaj problemoj kaj suferoj de la homaro," interrompis Frederiko agacite.

"...Kiam la vekilo sonoras matenfrue, ĝi laŭ antaŭa aranĝo sonoras precize dekdu minutojn antaŭ ol necese. Mi ellitiĝas, ekbruligas la fornon sub la kafo kaj griakvo, ŝaltas la varmigilon (se estas vintre) kaj resaltas reenliten. Post dekdu minutoj resonoras la vekilo kaj jen! Kafo en la kafujo, bolanta akvo por enmeti la grion, varma ĉambro sur kies plankon ekpaŝi, anstataŭ glacifrida afero..."

"Kaj ĉu vi ankaŭ ne forgesas bruligi cigaredon, meti ĝin sur la randon de la cindrujo, tiel ke jen! poste nur etendu la manon kaj..."

"Ve, ne sarkasmu, mia kamarado. Ĉu vi iam rimarkis, ke en la maŝinejo mi ĉiam sidas trankvile, kiam vi alvenas?"

"Jes, vi ĉiam alvenas tro frue. Versajne via sistemo..."

"Ne, la sistemo ne difektiĝas! Frua alveno al la deforejo ĉiutage estas ero de la sistemo. Ĉu vi neniam rimarkis, ke mi kutime sidas komforte kun ĵurnalo kaj kafo duonhoron antaŭ laborkomenco, dum vi alvenas je la plej lasta momento kaj devas freneze kuregi tien kaj reen, ŝanĝante la veston, trovante ilojn, premante la horindikilon -- ne mirige, ke vi je la deka horo matene jam laciĝas! Komenci la tagon prave, rezultigas tre bonan psikologian staton dum la tuta laborperiodo."

"Sed kial okupi vin pri 'korekta maniero ellitiĝi' kaj tiel plu, se vi ankoraŭ ne scias, ĉu aŭ ne vi vere ekzistas?"

"Pardonu?"

"Ne ĉikanu min; vi bone komprenas, kion mi volas diri," respondis mia amiko.

"Male, mi neniam komprenis tiun aferon. Ĉiam ŝajnis al mi komike, ke homo, besto fariĝinta inteligenta, persvadu sin ke li vere ne ekzistas!"

"Mi ne certas, ke homo estas besto nur."

"Ho, mi ne defendas tiun dogmon; apartenas al iu sciencendenca, sed ne sciencista, anglo. Ankaŭ mi mem ne certas. Sed se di-kreita, la homo des malpli rajtas pridubi sian ekziston, ĉu?"

"Ĉu do estas nur tiuj du eblecoj, di-kreaĵo aŭ besto?" demandis Frederiko. "Sed vi pelas min sur tangenton. Evidente vi dezi ras eviti tiun punkton, ĉirkaŭparolante..."

"Ne eviti... sed eĉ se mi decidus, ke mi reale ne ekzistas, ĉu tiu decido iamaniere ŝanĝus mian... mi preskaŭ diris ekziston... mian vivon? Ĉu mi ne plu sentus doloron, koleron, ĝojon? Ĉu mi ne plu malsekiĝus dum pluvo? Mi riskas ripeti, Frederiko: estas la etaj aferoj en la vivo, kiuj kondukas al kontento, kelkfoje eĉ al feliĉo."

Frederiko mienis ege malestime.

"Tiu aserto ja estas la plej banala, burĝa, sensignifa deklaro, kiun mi iam aŭdis!"

(daŭrigota)

KLM

La E-movado ŝajne havas du tipojn de adeptoj: la tute neagemajn... kaj la batalemajn. Eĉ en nia alie agrabla urbo, la interluktado jam komencas superi la Duan Mondmiliton. El plugiloj, glavojn; el tajpiloj... !! Pacon, gefratoj -- temas pri Paco!

Ni deziras informi niajn legantojn, ke JEN subtenas cent-po -cente la duan laborplanon de UEA, tiel kiel ĝi estis akceptita en la 47a Universala Kongreso, kaj ke ni estas pretaj agi laŭ ĝiaj principoj kaj instigi la usonan junan esperantistaron sekvi ĝiajn gvidliniojn por rapidigi la disvastigadon de la Lingvo Internacia.

KUNLABORADO

Intima Paralado de Via Sekretario

"Tro multaj de niaj klopodoj por progresigi nian noblan aferon estas perditaj sen alporti eĉ partan rezulton... Multe de la propaganda laboro estas farita... kun primitivaj rimedoj... Malgrandaj kluboj fondiĝas fungosimile... Malgrandaj gazetoj kaj 'ĵurnaloj' estas eldonataj kaj elspiras ilian animon. Libretoj kaj broŝuretoj estas presitaj, kun malmultaj aŭ neniam literatura valoro..."

AMERIKA ESPERANTISTO, Feb 1931

Dankon al Folkways Records pro atentigo pri Esperanto kaj pri la klopodado paroligi unu lingvon internacian tra la tuta mondo. La menciita diskentrepreno pritraktas Esperanton pro sia intereso pri "io ajn, kio esprimas popolojn."

Tiacele, Folkways Records eldonos, eble komence de la venonta jaro, diskon de paroladoj kaj kantoj E-lingvaj. Tiu disko, tute en Esperanto, estas farita ĉe la Kopenhaga Kongreso pasintan someron.

One Language for the World (Unu Lingvo por la Mondo) ne nur temas pri E-o sed ankaŭ pri internaciaj lingvoj ĝenerale. Oni pritraktas la romidajn lingvojn, inkluzive la portugalan, cetere la grekan, la germanan, la rusan, la finnan, kaj la ĉinan, kiel naturajn lingvojn. Lingvoj nenaturaj estas "Basic English," "Suma" de Russell, "Latino sine Flexione" de Peano, "Interglossa" de Hogben, "Nepo" de Ĉeŝiĥin, nia rivalo Interlingua; kaj laste oni preparolas Esperanton.

D-ro Mario Andrew Pei, la preleganto, tre bone prilaboris prezenti la kandidatecon de ĉiu lingvo. Li komencas per la helena, daŭrigas per la latina, pritraktas ĉiun nacilingvon kaj planlingvon, kaj finas per E-o.

La ideo pri planlingvoj estas historio komenciĝinta en la dekoka jarcento. Entute estis almenaŭ sep cent artefaritaj lingvoj, sed nur manplenumo trafis bonŝancon. D-ro Pei prezentas tre bonajn argumentojn pri la kaŭzo de planlingvoj.

Al tiuj, kiuj diras, ke iu nacia lingvo taŭgas por internacia lingvo, ĉar tiuj estas naturaj lingvoj dum konstruitaj lingvoj ne estas naturaj, la D-ro klarigas, ke tiu argumento "estas kvazaŭ diri, ke ĉevalo estas pli preferinda ol aŭtomobilo, ĉar ĉevalo estas natura dum aŭtomobilo estas artefarita produkto. Oni povas enmeti en lingvon, samkiel en aŭtomobilon, ĝuste tiujn bonaspektojn, kiujn oni deziras... versajne ni jam atingis tiun stadion de la civilizacio, ke ni povas manipuli lingvojn kiel ni manipulas multajn aliajn aferojn. Ni povas meti en nutraĵon tion, kion ni kredas necesa kaj dezirinda. Ni do povas fari iom same al lingvo destinita por tutmonda uzado."

Tiom dirite, tutbone. SED...! La bona d-ro volis fari "tour de force," ĉar li mem faras ĉiujn parolekzemplojn. Bedaŭrinde, ĉiuj lingvoj, kiujn li parolas, sonas same. Lia germana akcento estas malbona; ĉe la rusa oni eĉ ne povas rekoni la lingvon; fakte oni povas miskredi, ke oni dum la tuta afero aŭdas la saman lingvon. Ĉe la franca li estas nur tolerebla. Kaj ĉu vere, ke li estas italo??

Laste venas povra Esperanto -- la plej facile prononcebla! Unue, D-ro Pei donas al la "a" en "Esperanto" la sonon de "a" en "apple." Li legas poemon, la faman "Sur la Kampo" -- sed sen informiĝo oni ne scius, en kiu lingvo estas tiu poemo, tiel aĉe li prononcas. Kelkfoje li diras ekzemple "al la hor'," "ni, infanico" kaj "pasintico" anstataŭ prave "al la kor'," "ne, infaneco" kaj "pasinteco." Sume, la vokalsono de D-ro Pei konfuzige vagadas, de ia kvazaŭ Nov-Jorka vast-sona "a" ĝis preskaŭ Cockney-simila "a" de Eliza Doolittle. Estus estinta plibone, uzi denaskajn parolantojn por ilustrati la diversajn lingvojn.

Kun la disko estas libreto prezentanta la plenan tekston, mendebla de la firmo Folkways. Tiu libreto havas pli da valoro ol la disko, kaj estas bonega. Se vi deziras interesigi iun pri la "bela, facila lingvo Esperanto," ne aŭdigu tiun ĉi diskon! Donu la libreton, sed per tiu disko konvinki? Neniam!

--- Jozefo Fulmo

.....
KULTOJ, KLUBOJ, MISPREZENTOJ, BLUFOJ

Tiuj, kiuj malestime ĉikanas pri la "kulteca" aspekto de nia movado pretervidas multon. Kulto devenas de la latina cultus, tute ne riproĉinda vorto, kiu estis ankaŭ la origino de nia kulturo. Ĉu niaj akuzantoj konscie tiom komplimentas?

Tamen aliflanke, la neamikoj ankaŭ diras multon pri nia "klubeco," kaj tio estas io alia, ĉar klubo devenas de praskandinavia vorto signifanta "senforma maso."

Eble, ke filologiaj esploroj ne tre taŭgas por pruvi respektindecon...

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

ALIĜU AL JEN
ALIĜU AL ELNA
ALIĜU AL UEA

CELO KAJ SORTO

Multaj vortoj estas skribitaj (jen la problemo, efektive) de multaj verkistoj, kaj multaj vortoj skribiĝis de tiuj rekte pri la skribarto. Sed kiom da komponistoj skribis pri la komponado? Eble ja multaj, sed mi neniam legis ion tiuspecan... sed kion mi deziras pritrakti?

Tion, ke "nobla celo ne helpas al sukceso." Ĉar ankaŭ mi iam deziris iĝi aŭtoro, kaj emis debuti en beletran karieron verkante pri la verkado. Komence mi eĉ havis, sendube, kelkajn originalajn ideojn; sed eble mi tro multe legis pri mia temo, ĉar post ensorbado de pluraj komentoj pri la afero, de diversaj verkistoj, mi flankenmetis miajn pensojn originalajn, kaj alprenis tiujn de aliuloj. Estante honesta, mi volis plagiati nek ideojn nek vortojn. Konsekvence, mi ne plu verkis kaj rezignis la profesion.

Sed nun lastatempe mi interesiĝis pri la muzikkomponado. Ne estas tre produktiva afero, ĉar mi ne estas muzikisto; fakte nuraj diletantoj superas min, se temas pri talento. Sed malgraŭ mia senefikeco, mi ne timas provi ion ajn, kio havas por mi eĉ minimuman intereson. Kvankam mi ne estas lerta pri komponado aŭ muzikteorio, mi daŭre fuŝadas ĉe la piano kaj metas notojn sur liniaran paperon. Neniam utiligeblajn.

Ĉi-foje estis pli bonŝance; mi ne legis eĉ vorton de iu komponisto pri la kompona arto, sekve mi havas nur propran ideon pri tio: estas pli malfacile komponi, ol skribi. Ĉu subjektive? Eble. Facile troveblis ideoj por beletro, ne ĉiam verkeblaj sed almenaŭ memnaskitaj (ĝis la pruntado). Sed trovi originalan ideon por komponaĵo estas alia afero. Estas neeble! Ĉiu ideo, ĉiu takto kaj temo, similas al io jam aŭdita. Jen Bach-simila taktaro, jen ritmo bartok-eska, jen ĵazeca akordo (sed neniam tute ĵazeca; tio estus nenia solvo). El tia komponado plejofte rezultas malkomponado...

Kompreneble oni povas diri, "Vi konfesas, ke vi scias nur iometon pri la muziko. Kiu provas verki unuafoje en sia vivo, tiu devas verki laŭ tio, kion li legis. La samo veras ĉe komencanta komponisto."

Oni pravas. Tion oni povas diri. Sed la problemo havas aliajn implicaĵojn: la ripetado estas pli ofta en la muziko, ol en la literaturo, kaj kompreneble -- estas multege pli da vortoj en iu lingvo, ol notoj fareblaj de piano aŭ alia muzikilo. Same pri kombinoj de notoj. Tiel mi juĝas, ke bezoniĝas pli da imago-povo krei komponaĵon, ol verki literaturajn. Kelkaj verkistoj ja eksperimentis pri lingvoj kaj forlasis gramatikajn regulojn, sed ĝenerale verkistoj ne trafas malfacilecon inter la limoj de ordinara lingvouzado.

Aliflanke, se temas pri la komponisto, oni jam atingis la limojn de tona muziko. Multaj muzikistoj kredis, ke la plej glora kaj plej eminenta tona muziko jam estas komponita. Ili timis kaj malŝatis referadon aŭ ripetadon, kaj forlasante la tonecon, alprenis koncepton pri sentona muziko. Tiel senlimiĝinte, oni povas krei novan muzikon.

Sed ni lasis min fuŝanta ĉe la piano... Libera de limigoj, libera ekludi kaj inventi ion, kion mi volas, mi lasiĝis sola kun mia imagopovo. Kion fari? La cerbo plene de alies muziko, mi devis apartigi la familieran disde la nova, disde la originala. Sed la rezulto ne estis komponaĵo. Nur notoj, kiujn mi kunplektis, sensignife kaj senrilate. La afero atingis sian finon.

Iel mi devas esprimi min per kreado. Kiel sekvonte? Eble mi elprovos mian ŝancon pri la pentrado venontan jaron. Tio ja estos nova epizodo.....

--- Johano Kojstra

MULTAJN DANKOJN

...al S-ro Fernando Martínez, Direktoro de la Esperanto Scienca Servo pro la uzo de lia IBM skribmaŝino, kaj lia kunlaboro.

" M O R T O D E F I L Ĉ J O "

Ekpenso

En la venonta numero!!

Ne ĝenu vin pri tio, kiel vi aspektas al aliuloj; ili ne konas la veran vin, tiel vi ĉiam agadas sub masko!

ABONU AL JEN-BULTENO!!!

Kostas nur \$1 jare
SUBTENU VIAJN JUNAJN SAMIDEANOJN!

Vi bezonas Esperantistan junularan sekcion? Ni produktas ilin! Simple informu nin pri la dimensioj de la loko kie vi volas uzi ĝin, pri la preferata koloro kaj pri la plej taŭga materialo, kaj ni liveros al vi poŝtrevene tutan junularan sekcion, kune kun plenaj instrukcioj pri ĝia kunmetiĝo, kaj speciala estraro preta por uzado (kun centoj da nekutime netaj ecoj kaj kvalitoj).

Sed povus esti ke ni jam havas en stoko precize tion kion vi bezonas. Ekzemple, nia nova luksa modelo, Junularo Esperantista de Nordameriko. Tiu ĉi certe plenumos ĉiujn bezonojn de la usona esperantista junularo, kaj estis desegnita specife por unuigi la junajn esperantistojn de Usono kaj Kanado en tute neŭtralan organizon. Ĝia celo? Pli bone antaŭenigi Esperanton en nia kontinento (precipe inter la junularo), kaj prizorgi la interesojn de niaj junaj esperantistoj. Kosto de la tuta aparato? Nur unu dolaro! Skribu tuj!

Efektive, la firma starigo de tiu ĉi JEN ŝuldiĝas al kunveno en Cambridge (Mass.) pasintan semajnfino, kiam renkontiĝis Dick Kollin (nia sekretario) kaj John Kooistra - el Novjorko - Jonathan Pool kaj Stan Cohn - estraranoj de la Esperanto-Klubo ĉe Harvard - kaj Humphrey Tonkin - reprezentanto de la internacia organizo de la junaj esperantistoj (TEJO).

La plej gravan laboron jam faris la Novjorkanoj. Tiu ĉi kunveno gravis precipe pro interŝanĝo de spertoj, pro la longa diskutado pri organizado ktp. (Dufoje ni kunvenis, dum entute preskaŭ dek horoj), kaj pro la formalajoj kiujn ni faris. Estraron ni elektis, starigis membrokategoriojn, pridiskutis nian bul-tenon, decidis aliĝi al la internacia Esperanto-movado pere de TEJO, kaj - precipe - amikiĝis.

Nu, kion ni devas fari estonte? Unue, ni bezonas membrojn. Ni volas elfosigi ĉiujn junajn esperantistojn en Usono kaj Kanado, por ke ili partoprenu nian agadon. Due, ni bezonas ĉies helpon - absolute ĉies, ĉu de gejunuloj, ĉu de plenaĝuloj...

Ni memoros longe tiujn amikajn horojn en Cambridge, precipe - ni esperas - kiel la komencon de vere vigla agado flanke de niaj amerikaj junaj esperantistoj... Ĉu interesas vin nia nova luksa modelo? Ek al laboro, ĉiuj!



GRAND

